

Omăge al

La Fondinto de Grésillon

Sro Henri Micard, konata de ĉiuj esperantistoj en Francujo kaj de granda parto de la tutmonda esperantistaro, fondinto de la Esperantista Kulturdomo, mortis la 26an de majo post longaj suferoj. Malaperis homo al kiu la esperantistoj ŝuldas multon.

Antaŭ la milito en 1936 li fariĝis ĝenerala sekretario de la Grupo de Francaj Esperantistaj Instruistoj, kaj de tiu tempo ĝis la milito, li organizis ĉiujare, en konvena loko, Someran Lernejon, kien kunvenis esperantistaj geinstruistoj por lerni kaj praktiki la lingvon, kaj ankaŭ por diskuti pri propagando en la instruista medio. Kompreneble la milito ĉesigis ĉiun eblon sur la kampo esperantista. Tuj poste renaskiĝis la Grupo de Esperantistaj Edukistoj kaj Micard povis reorganizi la Somerajn Lernejojn. Li vizitis multajn lokojn, sed la organizado fariĝis pli kaj pli malfacila pro diversaj kialoj.

Tiam ĝermis en la spirito de Micard la ideo havigi, ne nur al la geinstruistoj, sed al la tuta esperantistaro, lokon sufiĉe grandan por organizi ne unu jaran renkontiĝon sed plurajn. Por ke ĝi estu la Domo de ĉiuj esperantistoj, estis necese ke ĝi estu sendependa.

Tri gravaj problemoj prezentiĝis : kiu povos organizi la aferon ? kie trovi lokon ? kiel pagi la elspezon certe grandan ? La unua problemo estis jam solvita ĉar Micard estis sufiĉe vigla, batalema kaj diplomata por sukcesi. Li zorgis pri la du aliaj problemoj helpata de pluraj kamaradoj geinstruistoj. En Septembro 1951 estis starigita societo kun kooperativa karaktero, t.e. ke ĉiu ano de la societo disponas nur pri unu voĉo en la ĝeneralaj kunvenoj kiom ajn nombraj estas liaj « financaj partoj ». La prezidanto elektita estis kompreneble Micard. Ĉiu « financa parto » estis (kaj ankoraŭ estas) 100,00 frk. Tre rapide la kasisto ricevis monon sed kiam ĉesis la monsendoj, la tuta sumo reprezentis eĉ ne duonon de la necesa elspezo. Nur post multaj klopodoj,

dank'al la ŝindonemo de pluraj amikoj, la societo povis finfine akiri bienon. Dume Micard transerĉis sian propran regionon por trovi taŭgan akireblan konstruaĵon. Li deziris ĝin trovi en sia regiono ĉar la distanco de Parizo ne estas tre longa, ĝi troviĝas en turisma loko proksime de la Loire valo, ne tro malproksime de la maro ; li ankaŭ sciis ke nur li povis zorgi pri la estrado de la Domo kaj estis necese, ke ĝi ne estu tro malproksima de lia loĝloko. Post espero kaj malesperoj, kies detaloj povas plenigi libreton, fine aperis sur la esperantista horizonto Grésillon, ĉarma granda Domo en bela parko. Post la aĉeto la societo « Kulturdomo de la Franclandaj Esperantistoj » estis posedanto de herbejoj, parko, lageto, granda ĝardeno, kaj de bela konstruaĵo... tute malplena. La elektra kurento kaj la kuranta

akvo venis nur en parteton de la konstruaĵo, oni devis akiri meblaron, kuirilojn, manĝilaron, ktp... kaj la kaso estis malplena. Denove sindonis la Prezidanto per prunto de mebloj, teleroj, ktp. kaj ankaŭ amikoj kiuj multe laboris por ke ĉiuj ĉambroj ricevu lumon kaj akvon.

Dum la somero 1952, Grésillon malfermis siajn pordojn kaj estis vizitata de 150 geesperantistoj el

nis la kialon de la manko de komforto, sed kelkaj tute ne.

Tiuj kiuj vizitis la kastelon en 1952 kaj revenas nun povas konstati la grandegan paŝon faritan. Nun Grésillon estas komforta. Kaj tiu grandega paŝo ni ŝuldas al Gesinjoroj Micard, ĉar la historio de la familio Micard kaj la historio de la Kulturdomo dum 14 jaroj interplektiĝis. Gesinjoroj Micard ricevis helpon sed la pli grandan parton de la laboro ili mem faris.

La unua paĝo turniĝis. La epoko de la pioniroj finiĝis. Tiuj kiuj prenis sur sin la respondecon de la daŭrigado de la afero ne rajtas esti malfideluloj. Ili neniam forgesu ke ili ricevis gravegan heredaĵon de granda homo, kies spirito ĉiam restu en lia kreaĵo.

